

Monique ARNAUD

El Francio

Mi naskiĝis la 27an de aprilo 1941 en Francio.

Iĝis instruistino en baza lernejo dum 2 jaroj poste vizitis la Universitaton de Grenoblo por lerni la anglan lingvon. Mi instruis la francan lingvon en Anglujo-Penistone Grammar School en Skotlando – Hamilton – en Usono - Bennington College Vermont kaj poste la anglan lingvon dum 35 jaroj en Francio.



Mi malkovris esperanton okaze de Internacia Renkontiĝo de Freinet Instruistoj en Svedio en 1978. Ek de 1981 mi proponis klubon en mia mezgrada lernejo kaj tion ĝis 2001 ; en 1993, kvar el miaj lernantoj partoprenis en la Infana kongreseto en Torre de Alborache Hispanio. Mi instruis esperanton okaze de staĝoj en Francio, Somerkursaro en Sidnejo, en 2009 kaj volontulis por instrui en Mazara del Valo dum 6 semajnoj en 2012. Mia unua UK estis en Beijing 1986 kaj sukcesis viziti dudekon da UK. Malpli ofte mi partoprenis en ILEI Konferencoj. En la komenco de la Jaroj 2000 mi iĝis kasisto de GEE franca sekcio de ILEI ĝis lastjare. Mi partoprenis diversajn Grundtvig projektojn , jen ligo al tre interesa laboro : www.noos.ch/ideo. Ek de 2005 partoprenis ĉiujare kunvenon kiel reprezentanto de ILEI ĉe Unesko kaj tuj sentis la neceson krei flugfolion por disdoni al la homoj.


2017-06-16

Jean-Pierre BOULET

El Francio

75 jaraĝa. Eksinstruisto pri angla lingvo en mezgrada lernejo, plie instruis interlingvistikon kaj esperanton en Universitato de Clermont-Ferrand. Mem lernis esperanton 21 jaraĝa en Londono kaj tuj kreis sian unuan esperanto-rondon (diverslandaj studentoj) - daŭre instruas al grupeto de pensiuloj. Partoprenis multajn esperanto-aranĝojn foje kiel ĉiĉerono ekzemple okaze de U.K. en Montpeliero, Florenco kaj Lillo. Pro la neatendita forpaso de Cl. Piron sukcese gvidis en MES post nur unu monato por prepari la anoncitan staĝon por kreado de verkantoj. Ek de 2001 partoprenis ĉiujare minimume unu kunvenon kiel reprezentanto de ILEI ĉe Unesko. Respondecis pri ateliero pri nutrado en Benino kadre de Konferenco de ILEI en 2008 kaj redaktis samteman libreton. Patro de Alinjo (kantgrupo "Ampifiki") kaj Francisko.

2017-06-14



Pascale VOLDOIRE

El Francio

Mi instruis la anglan dum 35 jaroj en mezlernejo. Kiam mi emeritiĝis en 2005, mi komencis lerni Esperanton.



La lingvo plaĉis al mi kaj mi fariĝis klubano de la fervojistoj en Liono, kie post kelkaj jaroj mi instruis la komencantojn. Mi organizis seminariojn en Chamonix inter 2011 kaj 2016.

Mi partoprenis diversajn staĝojn : Prago (CZ), Pluezek (FR), Nilvange (FR) kaj du Universalajn Kongresojn (Kopenhago, Danio kaj Lillo, Francio). Mi vizitis Bonn kaj Berlinon en Germanio por la pretigado de Eŭropa Programo por Lernado dum la tuta vivo.

Mi sukcese trapasis la skriban parton de la KER-ekzameno en nivelo B1 en 2009, sed neniam kuraĝis trapasi la parolan parton.

2017-06-01

Emmanuel **DESBRIERES**

El Francio

Naskigis la 1-an de februaro 1971, en Francio.

Esperantistigis en 1992
Instruisto pri historio-geografio kaj civitana edukado de 1996 ĝis nun.

Sukcesis en KER-ekzameno C1.

Mi **instruas esperanton** de la jaro 2000, en lernejoj kaj asocioj en diversaj lokoj.

Mi partopenis 2 **UK-ojn** (Florenco kaj Lillo) kaj multajn **eventojn** en Esperantio, eĉ mi organizis plurajn en mia regiono kaj kutimas ĉiĉeroni. Mian **prelegon** pri « Esperanto-1914 » mi faris en Nancio (urbodomo) okaze de la Europa Tago la 9-an de majo 2015 por prezenti la eskpozicion de Christophe Lavarenne, Josette Ducloyer kaj aliaj aŭtoroj. Mi estas en kontakto kun la **Nacia Muzeo de Esperanto de Gray**. Mi kunlaboras kaj estas kontrolanto ce **Esperanto-Wikipedio** de pluraj jaroj.

Ce **ILEI** mi estis helpanto dum la **Tria Tutmonda Kolokvo** pri Instruado de Esperanto en Neuchâtel en 2015.

Mi satus iĝi **observanto ĉe UNESKO** por ILEI.

Unue por sperti Ĝeneralan Konferencon kun niaj nunaj observantoj kaj pripensi, kion poste fari por konigi esperanton en UNESKO-medio.

Ekz : Ĉu ni mondscale kunlaborados ĉe Wikipedio pri **kulturaj kaj naturaj mondheredaĵoj?**



2017-06-01